

Heinrich Heine,  
 Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, VII  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Sur la monto la kastelo  
 En la Rejn' spegulas sin;  
 Mia ŝipo en sunhelo  
 Sur la akvo portas min.<sup>2</sup>

Moviĝantaj sub la vento  
 Brilas ondoj kiel or',  
 Ekvekiĝas en mi sento  
 Ripozinta en la kor'.

Feliĉige salutante  
 Logas for mi la river';  
 Sed mi scias: minacante  
 Loĝas en ĝi mort-danĝer'.

Supre estis ĝi ĝojiga  
 Kiel mia anatin',  
 Sed interne tre timiga,  
 Kun malico en la sin'.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, VII" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983.*

MR-138-1 / Arg-708-1424 (2012-12-07 19:46:15)

---

<sup>2</sup>aŭ:

En la Rejno speguliĝas  
 Sur la monto la kastel'  
 Gaje mia ŝip' moviĝas  
 En la brila suna hel'.